# TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO JUNIO 2006 / JARKOLEKTO 25

*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*

**Grumblema Georgo estis enmalsanulejigita. En la malsanulejo Georgo plendis pri ĉio kaj ĉiu, kaj grumblema Georgo ĉiam pravas. Vizitis lin lia edzino kaj nur por plialtigi lian humoron ŝi diris al Georgo: "Rigardu mia amiko, kiajn belegajn florojn vi ricevis. Kaj vidu kio estas skribita sur la karto: "Ni deziregas al vi baldaŭan resaniĝon… la personaro".**

**La 6an de majo akcidente falis en sia fabriko nia amikino, Katja Steele. Ne eblis al ŝi restariĝi, kaj malsanultransportilo irigis ŝin malsanulejen. Iu osteto en ŝia kokso estis rompita, kaj ŝi devis submetiĝi al operacio. Ni ĉiuj elkore deziregas al ŝi baldaŭan resaniĝon.**

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: "Lingvaj Resondoj".**



**Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

**Iu viro lavadis sian malgrandan "Festiva" -aŭton. Alia viro longan tempon rigardinte lin alproksimiĝis al li kaj diris: "Ne valoras la tempon akvumi ĝin, ĝi ne pligrandiĝos!".**

## Gravaj Esperanto-eventoj

**Sabaton la 3an kaj dimanĉon la 4an de junio "Esperanto en Sudaŭstralio" okazigos sian vintrokursaron en Hackham South Primary School", 78 Melsetter Road, Huntfield Heights, 5163!**

**Merkredon la 7an de junio ni kunvenos en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**Merkredon la 21an de junio ni kunvenos en Clarence Park ekde la 18a horo.**

**La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.**

**Sabaton la 24 de septembro ni ĉiuj ekskursos al Haveno Viktoro.**

**Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian- kaj mandolinmuziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A. 5012, telefono 8268 4021.**

**La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.**

**De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 2008 la U.K. okazos en belega Jokohamo, Japanujo.**

**Juna Petro dancante kun unu el la plej belegaj knabinoj flustris: "Se mi nur povus trovi la vojon al via koro".**

**"Jes, sed almenaŭ ĝi ne iras trans miajn piedojn!"**

## La Vintrokursaro

**Okazos, kiel vi jam scias, la nun tradicia Vintrokursaro, en Hackham South Primary School, 78 Melsetter Road, Huntfield Heights, 5163 la 3an kaj 4an de junio ekde la 9a horo.**

**Espereble multaj el vi kaj viaj geamikoj venos por aktive preni parton en la aranĝo. Venos almenaŭ du gemoŝtoj el Aŭstralia Esperanto-Asocio, ne nur kiel observantoj, sed certe ankaŭ por kontribui kaj lerni – aŭ instrui - ion pli. Temas pri la prezidanto Igor Couto kaj la sekretariino Miranda Lutz. Eble honoros nin**

**ankaŭ la vicprezidanto, Marcelo Leereveld per sia vizito!**

**La lernejo disponigos al ni plurajn klasĉambrojn kiel ankaŭ la komputilejon, bibliotekon kaj kafejon. Kvankam estos vintro estos komforte varme kaj lume en la lernejo.**

**Kvar aŭ kvin spertaj geinstruistoj instruos nin; Katja Steele, mondvojaĝinto kaj spertulino pri lingvoj kaj instruado instruos la komencantojn; Trevor Steele, mondvojaĝinto kaj eksĉefdirektoro de U.E.A., instruos la progresintojn, Sandor Horvath kaj Bob Felby, kiujn ĉiu konas, instruos la meznivelulojn.**

**Margaret Furness, Makso Wearing kaj Brendan Linnane prelegos.**

**Ĉiu kontribuos al la distrado, kaj ĉiutage Sandor gvidados ludojn!!!**

**La kosto estos nur $30 por la du tagoj, aŭ $15 por nur unu tago!**

**Estas planita provizora programo. Ĉiutage okazos du lecionoj, la unua daŭranta 120 minutojn, post kiu ni tagmanĝos unu horon. La dua daŭros nur 75 minutojn, sed estos 75 minutoj plenaj de amuzaĵoj.**

**Okazos ankaŭ almenaŭ kvar prelegoj, komuna kantado kaj lecionoj pri la arto tradukadi. Venu do por lerni, kunestadi kun viaj geamikoj, kaj amuziĝi!**

***"Ĉu vi aŭdis pri la akcidento, kiu okazis al Olsen dum lia edziĝo?"***

***"Ne, mi ankoraŭ ne vidis ŝin!"***

## Nancy Roy

**intervjuita de Katja Steele**

**La avino de Nancy estis irlanda. Ŝia plej juna, 11a infano iĝis la patrino de Nancy. La patra flanko estis skota, tiuj geavoj havis 9 infanojn.**



**Estis 1934 kiam la gepatroj de Nancy geedziĝis. Nancy estis ilia unua posteulo kaj en la sekvo de pliaj jaroj venis aliaj kvin infanoj. La naskiĝloko de Nancy estis la vilaĝo Straiton en Britujo, sed baldaŭ poste la familio translოĝiĝis al Dailly. Tie Nancy frekventis la bazan lernejon kaj kiel 13-jara ŝi ekvizitis la gimnazion en ne tre fora Girvan.**

**"Mi memoras la lunĉpaŭzojn en la gimnazio. La studentoj el la urbo iris hejmen, sed la junuloj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj havis liberan tempon, en kiu ili ofte luis remboatojn kaj remis en la haveno aŭ ĝis la rivero. Aliajn tagojn ni ludis specon de golfo, en vintro aŭ ĝenerale en la malvarmaj tagoj ni vizitis la bibliotekon aŭ la butikojn.**

**Sekvis kolegio en Glasgovo, de kie por la semajnfinoj Nancy kutime iris hejmen.**

**Ŝia unua laborposteno estis en oficejo kun butiko, sed ĝi daŭris nur unu monaton, ĉar ĝi ne kontentigis Nancy. La oficeja laboro en urbo Maybole estis jam plaĉa, ŝi restis tie unu jaron kaj dume ekkonis la knabon, kiu poste iĝis ŝia edzo. Du jarojn ŝi laboris por la registaro rilate la pensiojn.**

**"Mia amiko iĝis soldato kaj iris al Honkongo. Mi ricevis laboron en Parizo, post ses monatoj alian postenon ĉe SHAFE (Supreme Headquarters Allied Forces in Europe). Ĝi estis bona laboro, ni veturis al Hispanujo, Svisujo, Nederlando kaj Belgujo. Du jarojn poste mi, pro diversaj kialoj, rezignis al tiu posteno kaj iris al Londono, kie mi laboris en laboragentejo. Dum tiu tempo revenis mia amiko el Honkongo. Mallonge post tio mi reiris hejmen kaj trovis bonan laboron en la flughaveno."**

**Unu jaron post sia geedziĝo Nancy kaj Charlie elmigris al Aŭstralio, al Adelajdo (1959), kie ili ambaŭ rapide trovis laboron. Ilia unua infano naskiĝis en 1961 kaj baldaŭ post tio ili aĉetis malnovan domon en Rosewater. Post la alveno de la dua infano ili aĉetis terpecon en Holden Hill kaj konstruigis domon, en kiu Nancy loĝas ĝis nun. La tria kaj lasta infano naskiĝis ses monatojn post la translokiĝo.**



**"Tiam mi havis ekstreme malmulte da mono. Mi laboris dum du jaroj vespere kaj kiam Margaret, la plej juna infano, iris al la lernejo, mi trovis dumtagan postenon. Fine mi eklaboris kiel instruistino. Tion mi ŝatis, ĉar mi havis libertempon kune kun la infanoj. Ĉio estis bona dum tiu tempo." La tuta familio la unuan fojon vizitis la parencojn en Skotlando kaj ili feriadis ĉiujare.**

**"En 1981 Charlie iĝis malsana kaj mortis. Niaj filoj tiutempe jam laboris, sed la filino estis nur en la 12a klaso. Fine de la jaro mi foriris el mia laborposteno kaj kune kun la filino refoje vizitis Skotlandon. Post la reveno al Adelajdo ni ambaŭ ekstudis en la universitato, mi por ricevi diplomon pri instrukapablo."**

**Nancy refoje enposteniĝis en Salisbury en 1983 kaj restis tie ĝis sia pensiuliĝo en 1997.**

**"Mi prenis liertempon en 1988 kaj dum unu jaro loĝis kun mia patrino. Nun mi ĝuas la emeritiĝon. Mi vizitadas Skotlandon ĉiun duan aŭ trian jarojn kaj al mi venadas mia pli juna fratino."**

**Nun Nancy loĝas kun sia filo. Ŝia filino edziniĝis kaj loĝas en Sidnejo.**

**La rilato de Nancy al Esperanto komenciĝis antaŭ kvar jaroj. En la komunuma ĝardeno ŝi renkontis esperantistinon Gloria Bristow kaj eklernis la lingvon en ŝia klaso. Pere de la reto ŝi baldaŭ trovis pliajn informojn kaj adresojn rilate la lokan movadon, kontaktis la aktivulojn kaj mem ekpartoprenis la Esperanto-aranĝojn. Kompreneble ŝi ĉeestis la Somerkursaron en Adelajdo en 2005 kaj ankaŭ la ĉijaran en Kianinny.**

***Diras la edzino al sia edzo: "Baldaŭ nia familio konsistos el tri personoj."***

***"Ho, ĉu vere?" ekkrias ĝojege la edzo.***

***"Jes, miaj gepatroj eksgeedziĝos, kaj mia patrino transloĝiĝos al ni!"***

## Memoroj pri Jim Dally

**Mia amiko Jim Dally forpasis pasintan jaron dum ni estis en Litovujo. Unue Jim kaj mi ekkonis unu la alian en la fruaj 1950aj jaroj en la Ŝtata Biblioteko de Sudaŭstralio kiel ankaŭ en la drinkejo Richmond Hotel, kiam la "six o'clock swill" ankoraŭ regis.**

**Mi bone memoras iun okazon, kiam Jim kaj mi estis kune kun Geoffrey Farmer inter ebriigaj drinkejoj en Adelajdhaveno. Subite Geoffrey ektuŝis niajn ŝultrojn, iom saltetis kaj kriegis "Ŭiiii! Iu adelajdhavena policaŭtomobilo haltis apud ni. "Sobriĝu junuloj, vi nun estas en Adelajdhaveno!" La koncepto, ke iu ajn povas posedi civitan fieron pri Adelajdhaveno tre amuzis nin, kiam poste ni parolis pri tio en Hotelo Richmond.**

**Mi memoras alian okazon. Ni supren promenis tra nebulo de la tramhaltejo al Norton Summit Hotel.**

**Ni kantis *Foggy, foggy dew* antaŭ bruega fajrego dum la lokanoj nin bombardis per pencoj.**

**Mia ĉefa memoro pri la tiutempa Jim estas tiu pri iu, kiu amis la anglan lingvon kaj ĝiajn eblecojn. Preskaŭ pedandece.**

**Sed li estis grandanima. Mi ankoraŭ memoras kiom bonkora li estis al mi, senmona bibliotekasistanto, ŝovante kelkajn dekŝilingajn bankbiletojn en mian supran poŝon por ke mi daŭrigu la drinkadon.**

**Jim estis iomete danĝera en kaj al si mem. Li havis frenezan kuraĝon. Iam, sen iu ajn averto, li decidis, ke li devas liberigi la hundidojn, malfrue en la nokto, en la Gay's Arcade *Pet Centre.* Iom vundita pro tiu ago li estis arestita de la polico. Li pasigis la nokton en la malliberejo. Tie, li nin informis en la Richmond la sekvan tagon, la aero estis plena de inkkusenetoj, kiam li sukcese rezistis ĉiujn provojn preni liajn fingropremsignojn. Jim sukcese rifuzis ankaŭ aliĝi al la frumatena viciĝo, kiam McKinna, la brigadestro, inspektis tiujn venintajn dum la nokto.**

**Ĉiam ni enviis lian kuraĝon. Li vere amis vortojn. Iam, li parolis pri siaj tagoj ĉe la Beck Book Company kaj li diris: "Iurilate mi sentas la mankon de tiuj tagoj". Mi estis sufiĉe bonŝanca por diri: "Kiurilate? – ĉu en retrospektivo?" Kaj li daŭre pluparolis pri tio, dirante kiel klara tio estas, kaj kiel vera.**

**Kaj tiam li malaperis en zorge elektita kaj kultura mistero. Tiomgrade ke mia edzino iam opiniis, ke li estis nur fantaziaĵo !**

**Sed tio ne eblas!**

***Arturo Mortimer***

**Ole Svendsen iris Parizon por celebri sian 60-jariĝon. Post kiam li estis hejme lia kamarado demandis lin: "Kiel vi fartis en Parizo?"**

**"Bone, eĉ bonege", respondis Ole, sed mi bedaŭras, ke mi ne estis tie antaŭ 40 jaroj".**

**"Kiam Parizo estis Parizo, vi volas diri, ĉu ne?"**

**"Ne, kiam Ole Svendsen estis Ole Svendsen!"**

## "Esperanto en Sudaŭstralio"

**estis honorata inter la 16a kaj 19a de majo, kiam vizitis ilin la esperantista familio Cepuk el Francujo.**

**La patro de la familio, Darius prenis parton en la kunveno la 17an de majo, kaj bone, eĉ bonege, kontribuis al la kunveno per siaj lertaj respondoj al demandoj de niaj membroj!**

**Kelnero, kelnero, ĉu vi bonestas peti la trombonistoн ĉesigi sian ludadon dum mi manĝas?"**

**"Ĉu lia muziko ne plaĉas al vi?"**

**Jes, sed la trombono jam du fojojn forblovis mian manĝaĵon for de la telero!"**

## Al Esperanto en Sudaŭstralio pagis jam

**por 2006 la sekvaj entuziasmaj membroj:**

**Arturo kaj Libby; Audrey kaj Bob; Jennifer; Katja kaj Trevor; Helena kaj Sandor; Indrani, Pat Palmer, Annie Gleeson kaj Ashley Campbell, Eileen Jones, Nancy Roy kaj Gloria Bristow.**

**Ordinaraj membroj pagas $30; familiaj membroj $35; pensiuloj $20; familiaj gepensiuloj $25 kaj gejunuloj po $10.**

**Kent estis problema infano, kaj la patrino kunprenis lin al infanpsiĥologo.**

**"Ĉu la knabo sentas sin nesekura?" demandis la psiĥologo. "Ne, sed ĉiuj aliaj en la kvartalo sentas sin tiaj!"**

## Ostello Della Gioventu

**En Villa Camerata 2/4, Viale Righi, dek minutojn for de la Kongresejo per aŭtobuso 17, haltejo "Salviatino" troviĝas kampadejo, kie esperantistoj povos tranokti en tendo, aŭ ruldomo dum la Universala Kongreso.**

**La prezoj varias inter EUR. 7 kaj EUR.14.**

**Bonestu indiki vian nomon, retadreson, kongresnumeron kaj UEA-kodon. Post kiam vi estos elektinta vian preferatan solvon vi pagu al UEA aŭ al la kasisto de LKK, poŝtkonto 37312204, Federazione Esperantista Italiana, Via Villoresi 38, 20143 Milano ne forgesante aldoni ankaŭ bank- aŭ poŝtkostojn. Legu pli en http://www.ukflorenco2006.it/unikodo/gastigado/logxado/**

***Viro longan tempon estis tre malsana kaj nun li kuŝas hejme en la lito. Vizitas lin iu el liaj bonaj amikoj demandante: "Kiel vi fartas nuntempe?"***

***"Danke al Dio mi plisaniĝas, sed iam mi perdis preskaŭ ĉiun esperon. Fakte mi staris kun unu kruro trans la tombo".***

***"Hu," diris la amiko, "Ĉu brulis al vi la kruro, ĉar mi aŭdis ke estas tre varmege tie, ĉu ne?"***

## Korespondpeto

**Permesu al mi prezenti min. Mia nomo estas Abraham Langoume. Mi devenas el Senegalujo, sed loĝas en Bydgoszcz en Polujo jam naŭ monatojn. Mi estas tridek kvinjara fraŭlo seninfana. Mi studas en I.S.T.K. (Internacia Studumo pri Turismo) en Bydgoszcz kaj en AIS (Akademio Internacia de Sciencoj) en Sanmarino.**

**Mi estas praktikanta katoliko, ŝatas lingvojn, legadon kaj sporton. Mi parolas la diolan, t.e. mia gepatra lingvo parolata en Casamance, la suda parto de Senagalujo, la volofan, kiu estas la nacia lingvo de Senegalujo, la anglan, hispanan, Esperanton, kiun mi lernis memstare antaŭ unu jaro per malgranda lernolibreto, iomete la polan kaj italan.**

**Plaĉus al mi korespondi kun via Esperanto-grupo.**

**Elkorajn salutojn al vi ĉiuj de via,**

**Abraham Langoume.**

**Eta Jonatano kunmanĝis kun siaj gepatroj en restoracio. Lia patrino estas virino tre ŝparema, kaj manĝinte ŝi petis la kelneron enmeti la manĝaĵrestaĵojn en papersaketon, "por ke ankaŭ nia hundo satmanĝu!"**

**"Hura, ekkrias Jonaĉjo, mi ricevos hundon!"**